



Enhavo

- AMO 63v – horoj, alireblo
- Irano subtenas nin – ni subtenu ilin!
- Monda Organizaĵo pri Sano – nia lumturo
- Pliaj informfontoj
- Restu en izolo – restas la Eo-mondo!

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-11 sendita el Budapeŝto, la 10an de aprilo

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

AMO 63v pretigas sin urĝe

La AMO-seminario okazos en la 18a kaj 19a de aprilo – tio estas sabate kaj dimanĉe. Ĝi okazos lige kun la irana kongreso de Esperanto, kiu okazos rete en la 16a kaj 17a de aprilo (ĵaŭde-vendrede). Ĝi nomiĝas 63 v, ĉar ĝi okazos virtuale.

La horoj de tiu seminario estas jenaj:

Irana tempo:	15h – 18h (tio estas UTC +4h 30)
UTC:	10.30 -13.30 (ne validas por Britio!)
CEST:	12.30-15.30 (Centra Eŭropa Somera Tempo)

Uzu UTC por elkalkuli la tempon por via regiono.

Ni sendis en EKO 10 la skizan programon. Tio restas valida. Trovu ĝin alkröĉita.

Certaj kontribuantoj: Kayhan Sajadpour (la rolo de UMEA, la irana situacio); Mirejo Grosjean (Limoj), Amri Wandel (estrarano de UEA, stariginto de privirusa retejo de UEA).

Rezerva kontribuo: Stefan MacGill (SMG): kiel UMEA, ILEI, IKEF levu sin al la defio.

Seso da pliaj kontribuantoj estas kontaktitaj por aldoni sin laŭ la programo dissendita kun EKO 10.

La nombro de partoprenantoj estas limigitaj al 60, kun 40 lokoj rezervitaj por irananoj.

Kiu volos partopreni ekster Irano, sendu retmesaĝon al : <stefan.macgill@gmail.com>. Ne uzu aliajn komunikilojn. Tiu zorgos pri la respekto de la limo de 60 partoprenantoj. Elektitoj ricevos ĝustatempe la alirajn informojn. Pliaj informoj sekvos, tuj kiam eble!

La eblo starigi Zom-kunsidon por cent homoj havas kostojn. Nur €14, sed tio por irananoj, kiu maldank' al la sankcioj suferis krutan malvalorigon de la monunu. Maljustas, ke ili havu tiun koston, la AMO-programo volonte kovros tiun kosteton, sed maldank' al tiuj samaj sankcioj malfacilas tuj sendi monon. UEA kaj AMO tamen garantias kompenson al IREA – la Landa Asocio en Irano. Viaj donacoj pere de UEA bonvenas al Fondaĵo Canuto aŭ AM, kune kun klarigo "Irano kaj AMO 63v".

SMG agnoskas la helpon de Keyhan, Mirejo kaj Christoph, kune ni neimageble rapide reagis!

Pri la pandemio

Ni informiĝu rekte ĉe MOS.

Monda Organizaĵo pri Sano (MOS)

Mirejo Grosjean sendis ligon al la informejo de MOS (WHO):

https://www.who.int/docs/default-source/coronaviruse/situation-reports/20200314-sitrep-54-covid-19.pdf?sfvrsn=dcd46351_2

Kun plia ligo al:

<https://www.who.int/emergencies/diseases/novel-coronavirus-2019>

Kaj bazaj informoj:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Monda_Organizaĵo_pri_Sano



MOS rigore malpermesas uzon de ilia emblemo sen eksplicita permeso. Estu MOS nia lumturo en ŝtormaj temp-estoj.

La vic-prezidanto de UEA informas

<https://www.visualcapitalist.com/infection-trajectory-flattening-the-covid19-curve/>

Karaj, la supra retejo (en la angla) estas tre utila por ke ni kiel monda organizo havu rigardon pri la KOVIM-19-afero. Mi kopias la estraron/komitaton de UEA. Efektive la Estraro de UEA ĉiutage faras internajn konsiderojn pro la pandemio jam de pli ol du monatoj, kaj estas utile dividi niajn ilojn kun vi. Kore kaj kun espero kaj bondeziroj pri viaj sanoj kaj sekurecoj,

Fernando Maia Jr., Vicprezidanto de UEA

Trovu novajn solvojn!

Grupoj ĉe <yahoo.com> ĉesis funkcii, eĉ pluraj unuopaj retadresoj ĉe <yahoo> nun paneas.

Itala reago al la epidemio

Po la konataj nunaj problemoj en Italio, Itala Esperanto-Federacio ne povas presigi kaj dissendi la duan numeron de sia gazeto *L'Esperanto*.

Pro tio ni igis ĝn alirebla ĉe la itala tt-pagho per la adreso:

<http://www.bitoteko.it/items/show/933>. Bonan legadon

Michela Lipari

Intervuo kun d-ro Klawe en *Kontakto*.

Legu tiun intervjuon kun la prezidanto de UMEA el la plejlasta numero de *Kontakto*. UEA malfermu aliron al tiu numero de la multjare renoma revuo de TEJO.

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-aqado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2019/15. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.